Hana, Nia Heroo

Aŭtoro: Ali Asghar Seidabadi Ilustristo: Ghazaleh Seidabadi

Tradukinto: Bahar Shafiee

Je la nomo de la kreinto de la suno kaj la luno

Hana, Nia Heroo

Aŭtoro: Ali Asghar Seidabadi *Ilustristo: Ghazaleh Seidabadi*

Tradukinto: Bahar Shafiee

Hana, nia heroo

Aŭtoro: Ali Asghar Seidabadi

Ilustristo: Ghazaleh Seidabadi.

Tradukinto: Bahar Shafiee

Medicina Konsilisto: D-ro Hossein Kermanpour (MD)

Grafika desegno kaj arta direktisto: Elaheh Javanmard

Ĉi tiu libro estas la rezulto de kunlaboro inter la aŭtoro,
la ilustristo, kaj la tradukisto dum ilia hejma kvaranteno.

Tradukita kaj publikigita en la jaro 2020.

La publikigo de ĉi tiu libro estas libera en iu ajn lingvo, en iu ajn formo kaj ie ajn.

La tradukinto kore dankas S-roj Yves Nicolas kaj Dominik Cornice
Pro revizii la Esperantan tekston.

asedabadi
Seidabadii
aliseidabadi

La infanoj amis onklon Bahman kaj ili ĉiam vokis lin video-kontakte dum siaj kunvenoj.



Onklo Bahman ĵus revenis de vojaĝo kaj invitis ĉiujn infanoj al sia hejmo. La onklo preparis ĉion por siaj malgrandaj gastoj kaj atendis ilin, sed li ne sciis kio estas okazanta en sia korpo. Grupo de danĝeraj virusoj eniris lian korpon kaj en ĝi rapide multiĝis.

La onklo metis la kuketojn en ujon kaj almetis lian manon al sia frunto. Li ne fartis bone. Li pensis, ke eble li laciĝis pro longa vojaĝo. Sed li estis certa, ke kiam liaj gastoj alvenos, li havos bonan tempon kaj li fartos bone. Subite la sonorilo sonis.

Lia unua gasto estis Hana. Onklo amis Hana-on multe. Hana havis maskon sur la vizaĝo kaj gantojn sur la manoj. La onklo rigardis ŝin kaj ridis. Li iris por brakumi ŝin, sed Hana, kiu ĉiam saltis por esti karesita per sia onklo, haltis kaj diris: “Mia kara onklo, danĝera viruso estas trovita en nia lando. Ni devas esti tre zorgemaj!”

“Kial tio povas esti grava por ni?” La onklo ridis.

Sed li momente paŭzis kaj diris: “sed vi pravas! Estas pli bone iom zorgi.”

La Danĝera armeo de Virusoj ne restis ankoraŭ en la korpo de la onklo! Laciĝinte atendi en lia korpo, ili komencis ataki lian respiradan sistemon kaj atendis eliri de lia korpo kaj eniri en la infanajn korpojn.

La gastoj alvenis unu post la alia kaj estis ĝojegaj viziti la onklon, sed la onklo neniun brakumis aŭ kisis. Li montris Hana-on, kaj diris: “Ĉi-foje, kisado kaj brakumado estas malpermesitaj, kiel ŝi diras!”

La vizaĝo de Sara, kiu estis vid-al-vide al sia onklo, estis plena de tiuj danĝeraj malgrandaj virusoj. Tuj kiam ŝi enspiris, multaj virusoj verŝiĝis en ŝian korpon.

Farzad, ĉe la alia flanko de la tablo, atingis kaj prenis bongustan kukon kovritan per la virusoj.

La virusoj estis sur la manoj de Human. Li tuŝis sian vizaĝon per siaj manoj.

Anita estis apud la aliaj infanoj. Ŝi prenis papertukon sur kio la virusoj atendis. Ŝi purigis siajn okulojn per la papertuko.

Hana estis la plej malproksima kaj la virusoj ankoraŭ ne atingis ŝin. Grupo da virusoj etendiĝis sur brako de la komforta sofo kie ŝi estis sidanta. Ili rigardadis al Hana, kaj atendis, ke ŝi alproksimiĝu al la sofo kaj metu la manon sur ilin. Fine ŝi tion faris, kaj tiuj virusoj algluis ŝian manon kaj atendis avide por ke ŝi tuŝu sian vizaĝon per siaj manoj kaj ke ili komencu atakon. Sed Hana ne tuŝis sian vizaĝon.

La onklo sciis multajn amuzajn ludojn. Li amis ludi kun la infanoj. Fakte, li ludis kun la infanoj tiel longe, ke ĉiuj aliaj laciĝis. Post multe da ludado, la onklo komencis farti pli malbone. Li volis tion kaŝi, sed li tusis plurajn fojojn. Kun ĉiu tuso, armeo da virusoj flugis en la aeron, kaj falis sur la tablojn, la suvenirojn, la manĝetojn, la vizaĝojn kaj la manojn de la infanoj, atendante eblon komenci atakon. Post kiam la onklo ĉesis tusi, li invitis la infanojn por manĝi, kaj ili rapidis al la bongustaj manĝaĵoj!

Baldaŭ la onklo komencis pli kaj pli malboniĝi. La infanoj komencis zorgi pri li. Ili unue telefonis al siaj gepatroj, kaj poste telefonis al kuracisto. La kuracisto alvenis kun masko kaj stranga vestaĵo kiun la infanoj neniam antaŭe vidis.

La kuracisto ekzamenis la onklon kaj diris: “Li estas suspektata havi KOVID-19-an.”

La onklo iris al hospitalo. Kuracisto parolis kun la plenkreskuloj, kaj infanoj revenis al siaj hejmoj por esti kvarantenigitaj laŭ la ordonoj de la kuracisto. Se ili malsaniĝus, ili devus iri al la hospitalo. Hana iris al sia hejmo. La virusoj atendis sur siaj manoj kaj ili estis tre enuigitaj. Ŝi demetis siajn gantojn antaŭ ol hejmeniri kaj metis ilin en plastan sakon kaj fermis ĝin. Ŝi ankaŭ demetis siajn vestojn en la vestiblo de la domo, kaj metis ilin en alian saketon kaj poste iris internen. La plejmulto de la virusoj estis malliberigitaj en la plastaj sakoj kaj estis ĵetitaj en rubujon. Sed kiam Hana forigis siajn gantojn, malgranda grupo da virusoj alkroĉiĝis al ŝiaj manoj, atendante, ke ŝi faros eraron, por ke ili povu salti en ŝian korpon. Ŝia patrino kondukis Hana-on al la banĉambro. Hana iris lavi siajn manojn kun akvo kaj sapo, tiel ke ŝiaj manoj fariĝis tute puraj kaj la malgranda grupo da virusoj estis forŝovitaj en la kloakon.

La onklo restis en la hospitolo dum du semajnoj. Iuj el la infanoj malsaniĝis kaj iris al la hospitalo, kaj iuj estis kuracataj hejme. Ĉiuj krom Hana kiu ne permesis al la virusoj eniri ŝian korpon.

Iun tagon, kiam Hana enuiĝis restante hejme, la telefono sonoris. Ŝia patrino respondis la telefonon kaj ekkriis ĝoje, vokante Hana-on. Hana ekprenis la telefonon kaj aŭdis la lacan voĉon de ŝia onklo. La onklo jam resaniĝis kaj revenis hejmen. Ili parolis multe. Li rakontis pri lia malfacila tempo en la hospitalo. Hana rakontis lin pri la plurtaga hejma restado. Je la adiaŭa tempo, onklo diris: “Hana, vi estas nia heroo! Se mi estus pli zorgema tiun nokton, la infanoj ne havus tiajn problemojn.”

Nun ĉiuj el ili fartas bone. Ili ne foriras de siaj hejmoj, sed ili parolas kune kaj kun onklo Bahman ĉiutage. Ili sendas fotojn kaj filmojn unu al la aliaj.

Foje ili enuiĝas kaj pensas pri festotago, sed kiam ili rememoras pri la hospitalo kaj malsano, ili preferas resti hejme. “Hana, Nia Heroo!” estas fabelo por niaj infanoj en la tagoj de la Pandemio de KOVID-19. Ĝi estas simpla rakonto, kiu instruas nin kiel protekti nin kaj aliajn.

Ĉi tiu libro estas novjara (Noŭruzo) donaco de Irano al ĉiuj ĉirkaŭ la mondo. Vi estas bonvena publikigi ĉi tiun rakonton en ajna lingvo kaj formato.

Ĉi tiu libro estas la rezulto de kunlaboro inter la aŭtoro, la ilustristo, kaj la tradukistoj dum ilia hejma kvaranteno.

Eldoni ĉi tiun libron eblis helpe de aliaj. D-ro Hossein Kermanpour, la estro de krizaj servoj de Sina Hospitalo, kiu estis diagnozita kun KOVID-19, kaj poste rehabilitita, donis al ni bonajn konsilojn. S-ino Elaheh Javanmard faris la grafikan kaj la artan parton de ĉi tiu libro.